

| | | | |
|---|---|--|---|
| Heinrich Heine, Printempa saluto | Heinrich Heine, Softe vibras tra l'anim' | Heinrich Heine, Milde fluas tra la kor' | Heinrich Heine, Frühlingsbotschaft |
| <i>tradukita de Ludwig Emil Meier</i> | <i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i> | <i>tradukita de Valentin Melnikov</i> | |
| Iras ĉarma sonoret' Tra de mi animon. Sonu printemo kan- tet' En la malproksimon! | Softe vibras tra l'anim' melodi' tenera, flugu al la malprok- sim', kanto primavera! | Milde fluas tra la kor' kanto primavera. Flugu, melodi- sonor', en la vast' aera. | Leise zieht durch mein Gemüt Liebliches Geläute Klinge, kleines Frühlingslied, Kling hinaus ins Weite. |
| Ĝis la dom' forsonu vi, Kie floroj pendas! Diru al la roz', ke mi Saluteton sendas. | Flugu al florbeda dom', kaj se tie ĉarme ridos roz', en mia nom' ŝin salutu varme. | Flugu longe, sen ri- poz', super domoj flutu. Se troviĝos tie roz' – ĝin de mi salutu. | Kling hinaus, bis an das Haus, Wo die Blumen sprießen, Wenn du eine Rose schaust, Sag, ich laß sie grüßen. |
| ... | ... | ... | ... |

Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 - †1919) en 1908.

Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)

Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]. Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. Li verkis interalie la kant-libreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.

Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".

Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.

Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)

Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>. Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17).

Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)

Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto "Gutenberg.Spiegel" sub http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found.